

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## La 2021-a Jarkunveno de nia rondo

Kutime ni havas “jarkunvenon” en januaro, sed ĉi-jare en la 28a de februaro, pro la epidemio – kvankam nia distrikto estis sub la proklamo de la kriza situacio pro KOVIM 19, ni ja faris tion. La loko estis ĝuste nia propra Muzeo. La gubernia kunvencentro estis fermita, do la uzeblo de la Muzeo donis al ni bonan ŝancon.

El inter niaj 48 anoj (bedaŭrinde s-ro Takahasi Tuyosi forpasis en 2020), 14 efektive ĉeestis, kaj kun 14 mandatoj kaj 6 leteraj antaŭbalotoj estis, do kun 34 validaj voĉoj oni diskutis kaj jenaj aferoj estis fiksitaj.

1. Jarraporto por 2020 kaj jarplano por 2021
2. Kasraporto por 2020 kaj buĝeto por 2021
3. nomumo de estraranoj kaj revizoroj
4. regularo fiksita por ebligi interretan estraran kunsidon, kiu utiligas videan kanalon



Poste oni prezentis pri la Muzeo. La ĉefaj punktoj estas:

1. Oni oficiale malfermos la Esperanto-Muzeon Jokohaman al esperantistoj je la 25a de aprilo, kaj malfermos ĝin al la civitanoj en la majo aŭ junio.
2. Oni aĉetis 2 libroŝrankojn kun vitraj ŝirmiloj, por ke oni tenu en ili historie valorajn librojn.
3. Oni daŭrigis aranĝadon de libroj laŭ la antaŭe preparita katalogo. Tiu laboro estis farita de volontuloj, kiuj en januaro kaj februaro multe klopodis senpage por ke la Muzeo estu utila al la vizitontoj.
4. Venis valoraj dokumentoj, precipe de prof. Gotoo Hitosi el Universitato Tohoku, kiu baldaŭ emeritiĝos kaj la dokumentoj, kiujn li kaj antaŭuloj kolektis por la “Bibliografia Leksikono de Esperanto-Movado en Japanio” ne dispartiĝu.
5. Nun planate estas desegni grandlitere la nomon de la muzeo al la eksteraj muroj, flanke de la fervojaj reloj, por ke pasaĝeroj ekkonu nian ekziston.

**La estraranoj por mandato 2021-2022**  
s-ro Sibayama Zyun'iti (Prezidanto), s-ro Arai Kazuhiro, s-ino Miyazaki Hideko kaj s-ro Namba Fumiharu

**La revizoroj por mandato 2021-2022**  
s-ro Iwaya Mituru kaj s-ro Karibe Riiti

## La Muzeo estas malfermota en la 25a de aprilo!

kontakt-adreso: [info@esperanto.yokohama](mailto:info@esperanto.yokohama)

---

---

## La 119-a Legokunsido

---

---

En la 11a de septembro 2020 ni havis la 119-an legokunsidon por "Amo kaj malamo" de Julian Modest. Partoprenis 5 personoj.

### Facila kaj interesa – "Amo kaj malamo" de Julian Modest

Mizro Iwaya

Mi jam legis multon el tiu aŭtoro inkluzive de korelingva traduko. Mi povas diri ke ĉiu verko lia estas facila, modesta kaj delikata. Samo validas al liaj mikronoveloj, ĉiutagaj noveletoj kaj ankaŭ al krimromanoj kiel ĉi tiu.

La ĉefheroo de la historio estas Plamen Filov, riĉa entreprenisto en Burgo, Bulgario. La afero okazis ĉe la kvardekjara festeno de lia naskiĝo. Li trovis minacleteron en la ĝardeno post la festeno. Li haste pretigis sian familion kontraŭ probabla atako de malamikoj. Malgraŭ tio bedaŭrinde okazis abomenindaĵoj unu post la alia.

Unua duono de la novelo procedas tiamaniere en bona ritmo. Survoje estiĝis fatala afero ke la heroo estis murdita. Tiam la historio atingas nereturneblan zeniton. Aperas komisaro, serĝento k.a. por solvi la problemon. La enigmo estis teksita en zigzago, sed mi volas diri ke la solvado estas tro naiva. Kiam ni legas krimromanon, ni atendas suspensan streĉecon. Mia malkontento pri tiu ĉi verko, aŭ la verko de la aŭtoro ĝenerale, estas ke mankas aŭ ne sufiĉas tia suspensa streĉeco. Mi povas menciigi nur unu punkton pri tiu ĉi verko, ke kiam la patrino Flora esploras la kaŭzon de stranga bruoj en la domo, tiam mi sentis ne-antaŭvideblan eksciton pri la disvolviĝo de la historio. Necesas esti pli da tiaspeca suspenso, mi kredas.

La verko estas simpla kaj facila. Mi povas rekomendi al komencantoj kaj komencintoj legi tiun libron.

### Krimo en kapitalista mondo, sed ne nur kapitalisteca

--- "Amo kaj malamo" de Julian Modest

Sibayama Zyun'iti

Temas pri krimromano aŭ policromano kies scenejo estas Burgo, nome Burgas, komerca-

turisma urbo bulgara ĉe la Nigra Maro. La krimviktimo Plamen Filov estas riĉulo posedanta firmaon, hotelon, kaj havas seĝon en la Urba Konsilio, do sukcesinto, ankoraŭ 40-jara.

Nu, Bulgario kapitalismiĝis en 1989, kaj tiu ĉi verko aperis en 2019, do la sukcesinto en la romano certe povas komenci karieron en la 21a jarcento jam kapitalisme. Tio donas al mi freŝan impreson, ĉar mi konas la 1983-an socialisman landon Bulgario. La verkinto Julian Modest, 2 jarojn pli juna ol mi, certe spertis la grandan ŝanĝon kiel mezaĝulo, verkis en Esperanto jam tute kapitalisman mondon. Mi iom komprenas la situacion, ĉar mi vizitis socialisman Ĉeĥoslovakion kaj kapitalisman Slovakion. Mi supozas, ke juna Plamen Filov sukcesinta ricevis, krom sia lerto, influon de la inflaciiginta socio post la kapitalismiĝo.

Sed kompreneble la (mal)sukceso de unuopaj entreprenoj multe dependas de la personeco kaj la talento de tiu entreprenisto, kaj mi ŝatus pli scii la personecon kaj la (mal)talenton de Plamen Filov kaj de Stefan Lambov, lia amiko-ekskolego. Sed ĉu la krimo malpli dependas de tio, ol la "amo kaj malamo" de la koncernatoj? – kiel sugestas la titolo.

Nu, iom pri la scenoj interne de policejo. Estis al mi interese, kiel du polic-oficiroj interparolas: subulo estis elironta el la ĉambro de superulo, kaj la superulo alparolas: "Ĝis revido kaj sukceson.", al kiu replikas la subulo: "Ĝis revido." Kion japanaj policanoj dialogas en tia situacio? Interesas, tamen iom el la privata vivo de la superulo Safirov, kaj de la subulo Kolev.

Speciale interesa estas la situacio de la grekdevenaj homoj. Laŭ la rakonto, ili fuĝis de Greklando al la Nigra Maro kaj tie ekloĝis. Jam generacioj pasis, do kredeble afero antaŭ la Dua Mondomilito. Lastatempe oni aŭdas en novaĵo, ke arabaj kaj nordafrikaj fuĝantoj unue celas Grekion, kaj de tie pli fuĝas al la Nigra Maro.

## el Koreio

Saluton.

Kun ĝojo mi ricevis la numeron 359.

Min kore ĝojigis la novaĵo, kiu diras, ke NPO aĉetis novan domon nome 'Esperanto-Muzeo Jokohama'-n.

Aplaŭdon mi sendas al la samideanoj de Jokohamo.

La prospero de japana movado sendube donos influon al la najbaraj landoj.

Post la pandemio, mi volonte vizitos la muzeon kun koreaj samideanoj.

Sukceson kaj sinzorgon kontraŭ la pandemio,  
Amike via, LEE Jungkee  
2021/02/07



## el Aŭstralio

Karaj jokohamanoj,

Mi tre dankas pro via bulteneto. Leginte la artikolon de Mizro Iwaya pri La infana raso, mi memoris etan incidenton, kiam mi ĵus eklernis Esperanton, tiutempe instruante en Londono. Absoluta komencanto, mi iris al la librovendejo de BEA en la grandurbo kaj iom arogante demandis, "Ĉu estas io en via lingvo, kio repagos la energion lerni ĝin?" La vendisto, Herbert Platt, solene transdonis al mi *La infana raso* kaj krome konsilis, ke mi aĉetu vortaron. Kaj mi legis la eposon kun plezuro: pere de la vortaro kaj la tabelo de afiksoj mi ja komprenis eble la plej ambician tekston en la lingvo! Ja, la strukturo ebligas tion eĉ al komencanto, sed mi ne rekomendas ĝin kiel unuan legaĵon al miaj komencantoj!

Trevor Steele, Aŭstralio  
2021/02/21

## humuraĵo

## Aĝiĝinte al 81-jara

el la informilo "Ŝionkai-Dajori" n-ro 29, nov. 2020 (Ŝionkai estas nomo de maljunula grupo)

orig. Ŝiota Rjoei, trad. Tanigaŭa Hiroŝi

1. Vojon kruele kuras 18-jaraj,  
vojon kontraŭdirekte kuras 81-jaraj.
2. Korrompiĝemaj estas 18-jaraj,  
ostorompiĝemaj estas 81-jaraj.
3. Nenion ankoraŭ scias 18-jaraj,  
Nenion jam memoras 81-jaraj.
4. Sian sinon per amo plenigas 18-jaraj,  
sian gorĝon per moĉio plenigas 81-jaraj.
5. Je devivaloro maltrankviliĝas 18-jaraj,  
je medicinekzamenaj valoroj maltrankviliĝas 81-jaraj.
6. Sian memon priserĉas 18-jaraj,  
de aliuloj priserĉataj estas 81-jaraj.
7. Al la socio ekvojaĝas 18-jaraj,  
al la ĉielo ekvojaĝi preparas 81-jaraj.
8. Zeniton celas 18-jaraj,  
la finon celas 81-jaraj.
9. Je la futura songo raviĝas 18-jaraj,  
dumtutage ebrie songas 81-jaraj.



10. Pri siaj geavoj neniom priatentas 18-jaraj,  
Nur pri siaj genepoj priatentas 81-jaraj.
11. Laŭeble frue 20-jara fariĝi deziras 18-jaraj,  
se eble 20-jara fariĝi deziras 81-jaraj.
12. Nek monon, nek tempon havas 18-jaraj,  
kaj monon, kaj tempon uzi ne kapablas 81-jaraj.
13. Pro streĉigo tremas 18-jaraj,  
pro nenia kialo tremas 81-jaraj.
14. Pro ekscitiĝo korbatiĝas 18-jaraj,  
je kormalsano maltrankviliĝas 81-jaraj.
15. Nenion de aliuloj aŭskulti emas 18-jaraj,  
Nenion de aliuloj aŭdi povas 81-jaraj.

「半壽」を迎えて  
『紫苑会だより』2020.11.1 29号より  
塩田良英 作、谷川弘 訳

## donaco al Muzeo

## Heredaĵo de la libroj

## Yoshie kaj Dieter Kleemann

En la jaro 1969 aŭtune ni devis transloĝiĝi pro la profesia kaŭzo de Dieter, de Heidelberg al Karlsruhe.

Por trovi la novan loĝejon ni multe cerbumis. Finfine ni havis ideon peti helpon de esperantisto de tiu urbo. S-ro Helfers estis la delegito de Germanio en antaŭa tempo.

Li kun sia tre aktiva kaj helpema edzino komencis serĉi unu malgrandan kaj malmultekostan loĝejon por ni. En septembro de tiu sama jaro ni povis transloĝiĝi al unu loĝejo en la urbo. Niaj pakaĵoj estis malmultaj sed la peza frostŝranko donis problemon. Feliĉe unu japano en Heidelberg pretis helpi nin por transporto.

Nia loĝejo troviĝis sur la tria etaĝo. Dieter kaj nia amiko strebis supreniri kun tiu maŝino. Kiam ili finfine atingis la etaĝon, ili rimarkis ke ili iris ĝis la kvara etaĝo.... Tiun okazaĵon ni neniam forgesas ĝis hodiaŭ.

Ges-roj Helfers ne havis infanojn kaj neniun parencon. Kiel ilia nomo, Helfers-helpo, ili sindonis al ni multege. Ni mem junaj ne povis redoni ion al ili. Tamen Dieter kontribuis laŭpove al ambaŭ je la fino de ilia vivo.

La patro de s-ro Helfers estis la kaleŝkondukisto en la kortega familio en Karlsruhe. S-ro Helfers loĝis kiel infano en la kasteleto de dukino kiu ne havis infanon. Tiel s-ro Helfers estis amita de tiu dukino. Poste li heredis multajn librojn tre valorajn.

Iun tagon antaŭ la kristnaska festo en la jaro 1981 ni ricevis unu informon ke ni heredis tutan bibliotekon de s-ro Helfers. La domo estis vendita pro la garantio de s-ro Helfers kiu eniris en la maljunulejon kaj ni devas tuj preni ĉiujn librojn.

Feliĉe nia amiko, paciento estis preta helpi nin pri la transporto. Por ni estis grandega donaco por la kristonasko.

Tiuj malnovaj libroj, kiujn ni donacis al via biblioteko, havas longan historion. Tamen ni ege ĝojas ke tiuj valoraj dokumentoj ne perdiĝos vane en iu tago en iu loko.

Ni tre tre gratulas vin ke vi atingis vian celon. Daŭrigu, daŭrigu vian agadon por via unu parto de la vivo. Ĝi restos plu en tiu biblioteko. Ankoraŭfoje gratulon al vi ĉiuj.

Ni ricevis entute 56 librojn de ges-roj Kleemann, donacitajn de s-ro Helfers al ili en 1969. La librojn ni ricevis de ili jam antaŭ 2020. Pri la libroj ni ricevis jenan mesaĝon:

Krome en la 25a de februaro ĉi-jare, ni ricevis 18 librojn de s-ro Petr Chrdle el Ĉeĥio al nia muzeo. La libroj estas eldonitaj en la librejo Kava-Pech, pri kiu li okupiĝas. (Doi Ĉieko)

## pri la legita libro en klaso

## Leginte la libron

## “Rakontoj el la poŝtista sako”

Isiguro Tomoko

La Urbeto Novohronec troviĝas inter montoj. Preĝejo kaj ankaŭ poŝtoŝtelo estas en la urbeto. Sinjoro Vilko laboradas kiel poŝtisto en la distrikto. Jam de tridek du jaroj li laboras.

Li havas kamaradon Bruno, kiu estas biciklo. Ili estas tre bonaj kunuloj.

Iam ili renkontiĝis kun virkateto. Ĝia nomo estas Murko.

Murko aliĝis al la grupo de sinjoro Vilko kaj Bruno. De tiam ili estis trio. Iliaj karakteroj estas malsamaj, sed ĉiu havas sian propran kapablon.

Sinjoro Vilko estas respondeca en poŝtista servo.

En neĝ-amasiĝo per skioj li disportadis al ricevintoj.

Estas multaj laboroj en Kristonaska tempo sed kompreneble li okupiĝas trankvile.

Bruno agas prudente kaj ĝi komprenas kion fari. Do ĝi multe taŭgas por poŝtista biciklo.

Murko, la virkateto, estas dormema kaj soleca, sed ĝi estas iam kuraĝema.

Do ili interamikiĝis kune kun homoj en la distrikto.

Mi sentis bezonon fari daŭre modestan taskon en ĉiu tago, por ke la homo akiru konfidon de la aliaj homoj.

